Impona Ekofuturo

Josef Kavka

Lastatempe oftiĝas Esperanto-libroj, kiuj kapablas sukcese konkuri kun ambiciaj nacilingvaj verkoj el la sfero scienca. Jen, fakuloj povas pli kaj pli konvinkiĝadi, ke la zamenhofa lingvo taŭgas por klare kaj precize esprimi ajnan nuancon de la moderna pensado. Dank' al aperantaj fak-artikoloj, la planlingva terminologio disvolviĝas paralele kun la nacilingvaj, kvankam laŭ pli modesta skalo, ja kun nekompareble malpli da mon-subvencioj. La ripetiĝantan miraklon de rea kaj rea aperado de fakaj libroj Esperanto ŝuldas al siaj bravaj adeptoj, kiuj ne domaĝas labori ofereme, senlace, senpage; ofte eĉ sendanke de la mondo...

Ĉi tiuj malnovaj ideoj invadas nian menson ankaŭ dum trafoliumado da impona artikolaro EKOFUTURO, kiun eldonis (1984) Ekologia Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio. La dikan (420-paĝan) libron tre kompetente kunmetis prof. *Ĥristo Marinov*, zorge redaktis kaj korektis inĝ. *Petâr Todorov*. Adreso de l'eldoninto: BEA-Ekologia Sekcio, *Ĥristo Botev 97, SOFIA 1303*, Bulgario.

Temas pri preskaŭ trideko da traktaĵoj klasitaj laŭ jena ŝemo:

I. Nuntempa ekologio kaj teoriaj problemoj
II. Naturaj resursoj kaj estonteco
III. Estonteco kaj energio
IV. Ideoj pri la estonta ekologia ekvilibro.

Oni ne troigus, dirante, ke ĉiuj 27 traktaĵoj eksterordinare interesas eĉ laikan leganton. Ne mirinde: la urĝe akturala temaro ekologia nuntempe okupas atenton de vasta publiko. En espero, ke baldaŭ aperos pri EKOFUTURO recenzoj el profesie kompetentaj plumoj, ĉi-loke ni turnu nin al kelkaj problemetoj lingvaj, precipe leksikologiaj.

Dubformaj estas ekz. jenaj vortoj (paĝ-indike): sintetika (5) kvankam aliloke, ekz. sur p. 10, troviĝas la ĝusta formo: sinteza), evolucia (5, kvankam sur p. 10: evoluo), ekologizado (6), optimizado (8), enkategorigi (8), substancioj (10), geografisto (10), tematika (11) k.t.p.

Estas ja vere, ke iuj aŭtoroj sukcesis prezenti lingvaĵon, ĉi-rilate senriproĉan, tre puran.

Gramatikaj eraroj ne abundas, tamen iom ĝenas: transformiĝis en scienco (5), rilate la tasko (5), metodologiaj, aspektojn (8), kies teorio evoluigis Volter (11) k.t.p.

Kurioza estas transliterado de propraj nomoj: *Kiseljov* (5), *Kiselov* (7) — anst. la ĝusta: *Kiselev*. Cetere aliloke aperas la ĝusta *Fedorov* (12), ne *Fjodorov*. La laŭprononca transskribado, eĉ grave misformita, nepre ŝokas: *Genri Modsli* (36), k.t.p. Por internacia publiko tiaj manieroj apenaŭ konvenas...

Nu, certe ne havus sencon, harfende ekzameni la tutan libron kaj atentigi pri ĉiuj misoj. Espereble, la redakto de la venontaj EKOFUTURO-jarlibroj spertos ŝancon de pli kritika alpaŝo.

Ni finu per jena, tute formala, gloso: Se oni dediĉas tiom da peno pro eldoni tiaspece valoran libron, oni devus servi al si per tajpmaŝino, en kies klavaro troviĝas la necesaj supersignoj. Kial ĝeni la leganton per: ankaŭ, kontraŭ k.t.p.?

Ĉio ĉi tamen estas bagatelaĵoj. La ĉefa valoro de EKOFUTURO elstaras super ili kaj al la kunlaborintoj ni aplaŭdas plej sincere.

J. Kavka

Raporto pri agado de ISAE dum 1983

Christian Darbellay

Delegita reto

Ni akiris kelkajn novajn delgitojn, kiuj rapide kolektis sufiĉe multe da membroj:

Finnlando: s-ino *Mattlin*	*5*	(antaŭe 0)
Pollando: d-ro *Tyblewski*	*20*	(antaŭe 0)
Sovetio: d-ro *Gromav*	*39*	(antaŭe 0)
Svedio: prof. *Kiselman*	*15*	(antaŭe 2-3)

Fine de la jaro, la ĝenerala sekretario skribis al ĉ. 30 sciencistoj en Hispanio, por inviti ilin al membriĝo en ISAE kaj samtempe por trovi novan delegiton intern ili. Sed eĉ ne unu respondon li ricevis.

Membraro

Vidu la aldonitan statistikon por la jaroj 1978-1983.

Scienca Revuo

En julio aperis la du lastaj kajeroj por la volumo 1982, sed pote nenio pli.

Restrukturiĝo

La ĝenerala sekretario proponis restrukturiĝon de la scienc-faka agado (SR, 1983, 103-105). La propono aperis artikolforme en la plej gravaj Esperanto-revuoj (ESPERANTO, HEROLDO DE ESPERANTO, BUDAPEŜTA INFORMILO, EL POPOLA ĈINIO). Kvankam malmultaj reagoj alvenis al la ĝenerala sekretario, la afero evoluas.

Budapeŝto

La jarkunveno de ISAE okazis dum la 68-a Universala Kongreso de Esperanto. Partoprenis ĝin pli ol 120 personoj. Aperos aparta raporto pri ĝi.

Christian Darbellay
ĝenerala sekretario

Membrosatistiko de ISAE por la jaroj 1978-1983

	1978 JK	CD	DVM	1979 JK	CD	DVM	1980	DVM	1981	DVM	1982	DVM	1983	DVM
Argentino	2			2	3		3		4		5		4	
Aŭstralio	12	8	1	8	11	1	6	1	7	1	7	1		
Aŭstrio	8	8	1	6	7	1	7	1						
Belgio	23	4		5	7		6		5		3		5	
Brazilo	15	8		16										
Britio	21	21	1	26	23	1	16	1	16	1	18	1	13	1
Bulgario	9	10		9	10		9		5		5		3	
Ĉeĥoslovakio	25	25		23	23		21		21		21			
Danlando	12	10	1	11	10	1	9	1	7	1	7	1	6	1
Finnlando	23	4	1	23	4	1	4	1	4	1	4	1	2	1
Francio	42	43	4	44	47	4	42	4	42	4	45	4	56	3
Germania D.R.	13			3										
Germanio F.R.	31	31		32	32		28		28		31		29	
Hispanio	20	5		19	5		1		1		1			
Hungario	14	3		5			3		3				5	
Islando									3				5	
Italio	17	34	2	13	24	2	15	2	14	2	11	2	12	2
Japanio		21		31	13		13		14		17			
Jugoslavio		1	2		2		2		2		2		3	2
Kanado				8										
Meksikio		1		2	1		1		2		2			
Nederlando		26		25	25		27		29	27	27			
Norvegio		17	1	14	16	1	14	2	17	2	19	3	19	3
Novzelando	7	4		4	4		3		3		5		5	
Pollando	8			3							1		20	
Portugalio	7	1		7	1		1							
Rumanio	3			3										
Sovetio	76			78									39	
Svedio	7	13	1	12	4	1	4	1	4	1	6	1	15	1
Svisio	9	9	1	8	8	1	7	1	8	1	7	1	6	1
Usono	33	7		33	5		5	4	2	1				
Venezuelo				1							1		1	
Aliaj	12			6							1		1	
Sume	450	313	16	481	285	16	245	17	246	17	252	18	326	18

Ĉiuj nombroj inkludas la dumvivajn membrojn (DVM)

Oficiala Organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

Direttore responsabile: Aldo de' Giorgi
Registrazione n. 2 del 3.2.82 presso il Tribunale di Pisa
Stampato nel dicembre 1984 — Presita dum decembro 1984

Enhavo

N-ro 1 (147): sociscienca kajero

La politika ekonomio de *Adam Smith* - kaj ekonomiko de nia tempo
(*Bo Sandelin*) ..... p. 5

Afekcio en turismo
(*Tyburcjusz Tyblewski*) ..... p. 27

Regnard en Ruslando
(*L. I. Mursalieva*) ..... p. 37

Impona Ekofuturo
(*Josef Kavka*) ..... p. 42

Raporto pri agado de ISAE dum 1983
(*Christian Darbellay*) ..... p. 43